# La Bulteneto

Numero 64 Jaro 2021

DULINGVA MAGAZINO ELDONATA EN VIENO

ZWEISPRACHIGES MAGAZIN AUS WIEN



## La arto de la 1980aj jaroj

## Die Kunst der 80er Jahre

## EKSPOZICIO EN ALBERTINA MODERN VIENO

ĝis la 13a de februaro 2022

# La Bulteneto

Numero 64 Jaro 2021
Aliaj numeroj kiel pdf: bitoteko bulteneto
Redaktejo - eldonejo - presejo:
Rudolfinergasse 8/11, 1190 Vieno, Aŭstrio, Eŭropa Unio
Tekstoj: Albertina kaj La Bulteneto
esperanto@chello.at
Unverkäufliche, private Ausgabe - Nevendebla, privata eldono


Sur la titolpaĝo
Franz Gertsch
Irène, 1980
Akrilo sur kotono
Olbricht Collection © Franz Gertsch

Pliaj informoj kaj bildoj:
www.albertina.at/ausstellungen





Klaus Albrecht Schröder, la ĝenerala direktoro de Albertina kaj
Angela Stief, la kuratorino de la ekspozicio
dum la konferenco por la gazetaro en Albertina Modern
la 8an de oktobro 2021.




Promendistanco dek minutoj

# Die Kunst der 80er Jahre

Ausstellung in Albertina Modern bis 13. Februar 2022

Eine großangelegte Ausstellung dieser Epoche in der ALBERTINA MODERN führt vor Augen, wie Kunstschaffende in den 1980er Jahren die bestehenden Paradigmen aufbrechen und die Vielfalt im Ausdruck suchen. Die Kunst der 1980er-Jahre will überwältigen: Es ist die Zeit visuellen Überflusses, individueller Stile und unendlicher Geschichten. Daraus ergeben sich eine überbordende Bildlichkeit, ein großer Drang zum Erzählerischen und die Freude an der Erkundung von Materialien und neuen Medien. Künstler wie David Salle oder Julian Schnabel erschaffen das Bild als Fiktion. Bei Francesco Clemente oder Mimmo Paladino bestimmt ein zeit- und ortübergreifender Eklektizismus viele Arbeiten. Es finden sich Zitate von der Antike bis in die Gegenwart, die das Nicht-Authentische hervorheben und Altbekanntes unter neue Vorzeichen setzen. Die zentralen Exponenten des Jahrzehnts – Jeff Koons, Jean-Michel Basquiat, Keith Haring und Julian Schnabel – finden sich über noch zu entdeckendem Künstlertum wie Jack Goldstein, Isolde Joham und Julia Wachtel. Das Zitat, der Zweifel am Original bei Richard Prince oder Elaine Sturtevant, The Art of Sampling bei Gerwald Rockenschaub und David Salle zeigen, wie sehr die 80er Jahre für alle weiteren Entscheidungen der Kunst das wichtigste Jahrzehnt der jüngeren Kunstgeschichte waren. Der Verlust der Unmittelbarkeit durch eine sich zunehmend virtualisierende Welt, die sich nach und nach zu einer Mediengesellschaft entwickelt, spiegelt sich auch in einer Kunst des Simulacrums wider: Der Wahrheitsgehalt von Bildern aus High und Low Art wird generell in Zweifel gezogen, wenn sich Künstlerinnen wie Sherrie Levine oder Cindy Sherman mit dem Abbildcharakter per se auseinandersetzen und eine Wirklichkeit zweiten Grades erfinden.

# La Arto de la 1980aj jaroj

Ekspozicio en Albertina Modern ĝis la 13a de februaro 2022

En la 1980aj jaroj, ĉefe en Nordameriko kaj Eŭropo, artistoj rezignis pri konvenciaj modeloj kaj kreis verkojn, kiuj ne havas unuecan stilon.

Franz Gertsch [franc gerĉ] naskiĝis 1930 kaj estas svisa pentristo kaj grafikisto. Lia verko estas tre ampleksa: Akvareloj, fotorealismaj kaj hiperrealismaj pentraĵoj, unuopaj portretoj kaj lignogravuraĵoj.

Bruce Nauman [brus naŭmen] naskiĝis 1941 en usona Wayne [Illinois] kaj estas konceptartisto. Tiun ĉi vorton kreis la usonano Henry Flynt [henri flint]. Konceptarto evoluis el la abstrakta minimalismo kaj estas nun komprenata kiel objektarto kaj hepeningo.

Jean-Michel Basquiat [ĵaŭ-miŝél baskja], 1960-1988, naskiĝis kaj mortis en usona Novjorko. Li estis la unua eminenta pentristo kaj desegnisto, kies antaŭuloj estis afrikdevenaj. Kelkaj el liaj verkoj estas nov-ekspresionismaj. Li mortis pro troa dozo de heroino.

Francesco Clemente [franĉesko klemente] naskiĝis 1952 en Napolo. Pentradon li lernis aŭtodidakte. Liaj verkoj estas postmodernaj kaj transavangardaj.

Andy Warhol, 1928-1987, estis usona grafikisto, filmisto kaj eldonisto. Krome li estis fondinto kaj elstara reprezentanto de poparto.

David Salle naskiĝis 1962 en usona Oklahoma. Li estas konceptartisto kaj reprezentanto de alpropriga arto.

Sandro Chia [kia] naskiĝis 1946 en Florenco kaj estas la ĉefa reprezentanto de itala postmoderna avangardo.

Jeff Koons [ĝef kuns] naskiĝis 1955 kaj estas usona artisto. Liaj verkoj – kelkaj simple kunmetitaj balonoj – estas ironiaj kiaj kiĉaj.

Pri vivo kaj verkaro de Keith Haring (1958-1990) raportis La Bulteneto numero 19 en la jaro 2018. Ĝi estas senpage havebla en formato pdf ĉe esperanto@chello.at




Keith Haring kiel Ora Bovido. Por la honoro de Keith.
Desegnita de Walter Klag, Vieno, 2018.

# La 1980aj jaroj estis plenaj de historio

| | |
|---|---|
| 1979 | La prezo de nafto ege plialtiĝas. Ekonomia krizo. |
| 1980 - 1983 | Fondo de verdaj partioj en diversaj ŝtatoj. |
| 1980 | La sendependa sindikato Solidarność fondiĝas en Dancigo. |
| 1981 | Aidoso disvastiĝas. |
| 1985 | Reformoj en Sovetunio. |
| 1986 | Eksplodo de la nuklea centralo apud Ĉernobilo, tiam en Sovetunio. |
| 1989 | Malkonstruo de la Fera Kurteno en Eŭropo. |
| 1990 | Unuigo de la du germanaj ŝtatoj. |
| 1991 | Komenco de la disfalo de Sovetunio. |

En la arto de tiu epoko oni ne vidas tiujn eventojn, escepte de la aidosa pandemio.


Mortis pro aidoso interalie

Keith Haring, Usono, 1958-1990, grafitisto kaj pentristo;
Paul Thek, Usono, 1933-1988, pentristo kaj objektartisto;
Jochen Klein, Germanio, 1967-1997, pentristo;
David Wojnarowicz, Usono, 1954-1992, pentristo, fotisto, filmisto;
Martin Wong, Usono, 1946-1999, pentristo.

La kuratorino de la ekspozicio estas d-ino Angela Stief. Ŝi naskiĝis 1974 en Augsburg, ekde 1995 ŝi studis en Vieno, de 2002 ĝis 2013 ŝi estis kuratorino en Kunsthalle Wien (Arthalo Vieno). 2016 ŝi fondis asocion por la subteno de la arto kaj estis konsilisto por Viena Art-Semajno. Ekde 2021 ŝi estas direktorino de Albertina Modern.

Prononco: Stief [ŝtif]

WK2021



Bruce Nauman: Sex and Death by Murder and Suicide, 1985.
Sekso kaj Morto - Murdo kaj Memmortigo.
Neonröhren auf Aluminium montiert.
Neontuboj muntitaj sur aluminia plato.
Emanuel Hoffmann-Stiftung, Depositum in der Öffentlichen Kunstsammlung Basel © Bruce Nauman/ Bildrecht, Wien, 2021.
Foto: Bisig & Bayer, Basel.




Jean-Michel Basquiat, Francesco Clemente & Andy Warhol:
Alba's Breakfast, 1984 - Matenmanĝo de Alba.
Mischtechnik auf Papier, auf Leinwand aufgezogen.
Diversaj teknikoj sur papero, tiu sur tolo.
Bischofberger Collection, Männedorf-Zurich, Switzerland.
© The Estate of Jean-Michel Basquiat / Bildrecht, Wien 2021.
© The Andy Warhol Foundation for the Visual Arts, Inc. / Licensed by Bildrecht, Vienna 2021 © Francesco Clemente.



Francesco Clemente:
Hermaphrodite, 1985 – Hermafrodito.
Gouache auf handgeschöpftem Pondicherry-Papier.
Guaŝo sur mane farita pondiĉeria papero.
ALBERTINA, Wien - The JABLONKA Collection.
© Francesco Clemente.




David Salle:
Room with blue statue, 1986.
Ĉambro kun blua statuo. Tiu pentraĵo konsistas el du partoj.
Öl, Acryl und lichtempfindliches Leinen auf Leinwand.
Oleo, akrilo kaj lumsentiva tolo sur pentrista tolo.
ALBERTINA, Wien – The ESSL © Bildrecht, Wien, 2021.



Sandro Chia (*1946):
Verso Damasco, 1981.
Öl auf Leinwand – Oleo sur tolo.
Bischofberger Collection, Männedorf-Zurich, Switzerland.
© Bildrecht, Wien.



Jeff Koons:
Bear and Policeman, 1988.
Urso kaj policisto. Lakita ligno.
Kunstmuseum Wolfsburg © Jeff Koons.



Dorsflanko.
Foto Klag 2021.








Telera bild-objekto el la jaro 1989
de Julian Schnabel, *1951 en Usono.
Foto Klag 2021.





Detaloj. Foto Klag 2021.







Humura kaj bonhumora objektartaĵo el la jaro 1989
de Haim Steinbach, *1944 en Rechovot,
interalie el plaste kovrita ligno kaj aluminiaj kuirpotoj.
Foto Klag 2021




Lanterno „al” Ebriuloj de Martin Kippenberger el la jaro 1988 kaj
La Vojaĝanto de Alois Moosbacher el la jaro 1980.
Ambaŭ el privata kolekto.
Foto Klag 2021.






Albert Oehlen, *1954 en Krefeld:
Elgasa Kapo, 1984.
Oleo sur tolo.
Albertina, Kolekto Essl.
Foto Klag 2021.

# Nova muzeo por moderna arto en Vieno

*Albertina Modern* estas unu el la plej grandaj muzeoj por la arto de la Moderno kaj de la nuntempo kaj disponas pri pli ol 60 mil verkoj de 5000 artistoj.

Pro la koronvirusa pandemio ĝi malfermiĝis iom prokrastite la 27an de majo 2020. Albertina Modern estas la dua loko de la tradicia muzeo Albertina en Vieno. Unu el la celoj estas la daŭra konservado de la kolekto Essl, kies domo en Klosterneuburg (Klostronovburgo) ĉe Vieno pro financaj kialoj ne plu estas vizitebla por la publiko. Malavare finance subtenis la projekton la industriisto Hans Peter Haselsteiner en konsento kun Klaus Albrecht Schröder, la ĝenerala direktoro de Albertina.

La Artista Domo – germane Künstlerhaus – estis donaco de la aŭstra imperiestro Franz Joseph [Francisko Jozefo la Unua] al la artistaro. Ĝi konstruiĝis 1865 en historiisma stilo kiel prestiĝa projekto. En la sekvaj jaroj ĝi ofte alikonstruiĝis kaj uziĝis por Vienaj Festsemajnoj. La Historia Muzeo de la Urbo Vieno montris tie ekspoziciojn. Dum la lastaj dudek jaroj la domo estis ofte kaŝita de skafaldoj kaj tial apenaŭ videbla.

Dum la lastaj tri jaroj la tuta konstruaĵo detale renoviĝis kaj parte alikonstruiĝis interne kaj ekstere sen ĝeni la originalan impreson. La originalaj murpentraĵoj, dekoraĵoj kaj teracaj pavimoj (itale: terrazzo [teraco]) rekonstruiĝis. Nove konstruiĝis du porkrizokazaj ŝtuparoj, kaj ramploj por rulseĝuzantoj. Instaliĝis sekureca sistemo, moderna lumiga ekipaĵo kaj klimatizilo.

En la supra etaĝo de tiu pompa konstruaĵo troviĝas ejo por la Socio de Geartistoj de la Figura Arto de Aŭstrio „Künstlerhaus“, kiu povas montri ekspoziciojn kaj surscenigi ion en la renovigita domo.

Pri Albertina Modern raportis La Bulteneto numero 60. Ĝi estas senpage havebla en formato pdf ĉe esperanto@chello.at




Albertina Modern kaj Karlsplatz. © Walter Klag 2021





Enirejo de Albertina Modern. © Walter Klag 2021

# Informoj kaj anoncoj
# Bitte beachten Sie auch die folgenden Seiten



Floro de frago fotita de Irene Klag

# Valora donaco por amiko de Esperanto

En Vieno aperis du arĝentaj medaloj en la formo de 50-Stela kaj 100-Stela moneroj.




Okaze de la 150a naskiĝ-datreveno de la svisa esperantisto René de Saussure aperis 2018 tiu 100-Stela *monero*.
Maso unu unco (31,1 gramoj) da arĝento 999/1000, diametro 37 mm, surfaco polurita (proof), eldonkvanto nur 1000. Arĝenta stampo 925, liverado en kapsulo. La dezajnon kreis magistro Helmut Andexlinger, la ĉefgravuristo de la renoma ŝtata aŭstria monerfarejo Münze Österreich.
Prezo 50 € plus sendokostoj.




2020 aperis arĝenta 50-Stela *monero* por la honoro de la nederlanda esperantistino Julia Isbrücker.
Maso 30 gramoj da arĝento 925/1000, diametro 40 mm, surfaco polurita (proof).
Eldonkvanto nur 300. La dezajnon kreis magistro Helmut Andexlinger, la ĉefgravuristo de la renoma ŝtata aŭstria monerfarejo Münze Österreich.
Prezo 60 € plus sendokostoj.

Mendoj: esperanto@chello.at. Mag. Walter Klag

# Esperanto-Numismatika Asocio



Estimata samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable unuNura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol ses jaroj ĝis 148 individuaj membroj kaj 23 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la *NUR PERRETA* revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŝuti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn (4 n-rojn jare).

Vi krome rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon
Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”
bert.boon@skynet.be



# 135 Jahre Erfolg und Tradition



| | |
|---|---|
| 1887 | Das erste Esperanto-Lehrbuch erscheint |
| 1905 | 1. Esperanto-Weltkongress in Boulogne-sur-Mer, Frankreich |
| 1908 | Gründung des Esperanto-Weltbundes UEA in der Schweiz: www.uea.org |
| 1912 | Die ersten Spesmilo-Münzen werden geprägt |
| 1922 | Erste Esperanto-Radiosendungen, in Newark und London |
| 1938 | Gründung des Esperanto-Jugendweltbundes TEJO: tejo.org |
| 1959 | Die ersten Stelo-Münzen werden geprägt |
| 1965 | 50. Esperanto-Weltkongress in Tokio, der erste Weltkongress in Asien |
| 1966 | Pasporta Servo erscheint erstmalig: www.pasportaservo.org<br>Heute 1800 esperantosprachige Gastgeber in über 100 Ländern |
| 1970 | Das Definitionswörterbuch Plena Ilustrita Vortaro wird herausgegeben:<br>kono.be/vivo oder vortaro.net |
| 1980 | Die Monatszeitschrift Monato erscheint erstmals: www.monato.net |
| 1986 | Erstmals ein Esperanto-Weltkongress in Beijing, China; neuerlich 2004. |
| 2001 | Chuck Smith gründet die esperantosprachige Vikipedio: eo.wikipedia.org |
| 2002 | Der Internet-Esperantokurs lernu startet: www.lernu.net<br>Mehr als 300 000 Anmeldungen bis heute |
| 2006 | Herzberg am Harz, Niedersachsen, wird offiziell Esperantostadt: esperanto-urbo.de |
| 2008 | Erstmalig Esperanto-Prüfungen nach dem Gemeinsamen Europäischen<br>Referenzrahmen: www.edukado.net/ekzamenoj/ker |
| 2011 | Gründung von Muzaiko, Esperanto-Musik: www.muzaiko.info |
| 2012 | Google macht Esperanto-Übersetzungen |
| 2014 | Erstmals Esperanto-Fernsehen: Google > esperanto televido |
| 2015 | Duolingo – Neuer Esperantokurs für Englischsprachige,<br>danach auch für Spanisch- und Portugiesischsprachige:<br>www.duolingo.com Mehr als 3 Millionen Anmeldungen bis heute |
| 2017 | 102. Esperanto-Weltkongress in Seoul, Südkorea |
| 2018 | Die silberne 100-Steloj-Münze wird herausgegeben |
| 2019 | 104. Esperanto-Weltkongress in Lahti, Finnland |
| 2020 | Zum Julia Isbrücker-Jahr erscheint die silberne 50-Steloj-Münze |
| 2020 | eventa servo verzeichnet hunderte aktuelle Esperanto-Veranstaltungen |
| 2021 | Starker Anstieg der Esperantotreffen mit Zoom |
| 2021 | 106. Esperanto-Weltkongress virtuell |
| 2022 | 78. Esperanto-Jugend-Weltkongress |
| 2022 | 107. Esperanto-Weltkongress in Montreal, Kanada |
| 2023 | 108. Esperanto-Weltkongress in Turin, Italien |



**Weltweit Kontakte durch die leicht erlernbare Sprache**

# ESPERANTO

**Wir lernen in einer Stunde die Esperanto - Grundlagen**

**in einem *gemütlichen* Café in Wien**

## Ort und Termine: eventa servo vieno

Teilnahme und Lernmaterial kostenfrei ❁ Keine Spende ❁ Anmeldung unbedingt erforderlich

Es wird gebeten im Lokal etwas zu konsumieren

*Gemeinsam - Gemütlich - Gratis*



# Esperanto-Bibliothek und Ausstellungsräume

Wien 1., Herrengasse 9
Haltestelle Herrengasse der U3
☏ 0043 1 534 10 730 💻 esperanto@onb.ac.at

Öffnungszeiten: Dienstag bis Sonntag 10 bis 18 h
Donnerstag 10 bis 21 h

**Esperantokurse und Führungen auf Anfrage.**

Im selben Haus befinden sich auch die
**Sammlung für Plansprachen,**
die
**Musikaliensammlung**
und das
**Globenmuseum**